

James Krüss,

Hanselmann muss schlafen gehn

James Krüss,

Enlitiĝi devas vi

tradukita de Manfred Retzlaff

Enlitiĝi devas vi,
 ĉar jam la malhelo
 de l' vespero ĉirkaŭ ni
 nun ekregas ĉie ĉi,
 lumas hela stelo.

Dormos baldaŭ jam la sun'
 en la nigra spaco.
 Kaj la viro sur la lun'
 iras en la liton nun
 pro treega laco.

La paseroj de l' tegment'
 iris en la nestojn.
 Sin kuŝigis eĉ la vent',
 nur la kat' en la silent'
 ĉasas nokte bestojn.

Ĉar fariĝis nun vesper'
 ĉiuj sin kaŝigas.
 Sed kelkiun la mizer',
 la doloro kaj sufer'
 tute maldormigas.

...

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JAMES KRÜSS (Jakobo Krujso, *1926-05.31 – †1997-08.02). Traduko de la Germana poemo “Hanselmann muss schlafen gehn” de JAMES KRÜSS (Jakobo Krujso, *1926-05.31 – †1997-08.02) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1983.*

Arg-669-1343 (2012-11-21 19:24:38)

MR-082-1 / Arg-669-1344 (2012-11-21 19:37:30)